Poste mi partoprenis la 96-an Universalan Kongreson (UK), kiu okazis en Bella Center en Kopenhago. La kongreso okazis de la 23a ĝis la 30a de julio kaj ĝia temo estis "Dialogo kaj interkompreno". Laŭ la raporto de la Solena Fermo, la kongreson ĉe-estis 1 458 personoj el 66 landoj. Dum la UK mi konatiĝis kun eĉ pli multe da esperantistoj kaj havis okazon rakonti iomete pri Indonezio kaj la tiea E-movado. Estis multege da interesaj programeroj pri diversaj temoj kaj utilaj

informoj kiuj prezentigis dum prelegoj. La partoprenantoj laŭvole elektis la programerojn kiuj plaĉis al ili. Aldone estis organizitaj kelkaj ekskursoj por la kongresanoj kiuj volis scii pli pri la belaj kaj historiaj turismaj lokoj en la urbo. Multaj kongresanoj interesiĝis ankaŭ pri koncertoj, teatraĵoj kaj aliaj artaj programeroj. Speciale, en la Internacia Arta Vespero, denove mi kaj mia amikino prezentis nian tradicion dancon apud aliaj kongresanoj, kiuj kantis, dancis aŭ prezentis sian kulturon. La UK estis grava evento por mi, ĉar tie mi povis vidi mem la movadon pere de multaj E-organizaĵoj. En la UK Heidi Goes prezentis siajn vojaĝojn en Indonezio en 2009 kaj 2010 por instrui Esperanton, kaj mi informis pri la progreso de la Esperanto-movado en Ĝakarto kaj, ĝenerale, en Indonezio. Mi tre ĝojis partopreni en ĉi tiu UK kaj espereble mi povos iri ankaŭ al la venontjara, okazonta en Hanojo de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto.

Bedaŭre mi ne povis ĉeesti la Solenan Fermon de la kongreso, ĉar mi devis foriri al alia E-aranĝo. Tiumatene mi iris per buso al Nitra (Slovakio), kie okazis la Somera Esperanto-Studado (SES). SES estas ĉiujara evento, organizata por la uzantoj de lernu.net. Antaŭ ol aliĝi al la programo, oni devas trapasi ekzamenon por difini la klason. Laŭ la rezulto de la ekzameno, mi aliĝis al la 4-a klaso, kiu estas meznivela. Dum 5 tagoj mi kaj 24 aliaj personoj lernis Esperanton pere de interesaj materialoj. Ni praktikis kiel paroli, skribi kaj aŭs-

kulti bone. La kurso de SES estas dividita en 5 klasojn plus unu klaso por seminario. Dum la SES la partoprenantoj havis ankaŭ distrajn programerojn, ekzemple koncertojn, junularan programon, sporton, ekskursojn kaj arton. Ĉi-jare SES okazis de la 30a de julio ĝis la 7a de aŭgusto. En la fino de la programo, ĉiu ricevis atestilon.

Mi ne povis fini la kurson en SES, ĉar mi devis foriri al la KELI-konferenco, kiu okazis en Poděbrady (Ĉeĥio). La konferenco daŭris unu semajnon, de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto. Mi partoprenis ĝin dum nur tri tagoj. Kiam mi alvenis per trajno en la stacidomon, mi surprizigis ke du esperantistoj atendas kaj veturigas min al la kongresejo. Estis bona sperto, ĉar mi konatiĝis kun kristanaj esperantistoj, kiuj tre ĝojis bonvenigi nin. Plejparte la membroj estas maljunaj, sed ili ankoraŭ estas sufiĉe aktivaj por subteni la agadojn de KELI, kaj bone konas la progreson de la organizaĵo. Partoprenis la aranĝon 50 personoj el 13 landoj. Estis matena programero por kune preĝi antaŭ la matenmanĝo. Post tiu ĉi, la partoprenantoj foriris al la kongresejo. Ĉiutage la kongreso daŭris de la 9a matene ĝis la 9a vespere, kun vespera preĝo kiel la lasta programero. Interese estis ke la dimanĉa diservo okazis dulingve: Esperante kaj ĉeĥe. Mi ricevis valoran donacon de la estraro de KELI, nome Biblion en Esperanto. Ĝenerale mi aprezas la bonan organizadon de la konferenco.

La lasta E-evento kiun mi partoprenis estis la Itala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto en Torino. La kongreso komenciĝis sabate vespere per la programero Verda Foiro, kie oni povis akiri informojn pri la movado kaj venontaj E-aranĝoj. Dimanĉe matene okazis la oficiala malfermo, kiun partoprenis Probal Dasgupta, la Prezidanto de UEA, per oficiala malferma parolado. La malfermo estis aparte grava. Saluti homojn el 26 landoj de 5 kontinentoj (Afriko, Azio, Eŭropo, Norda Ameriko kaj Suda Ameriko). Ankaŭ mi havis la okazon saluti la kongresanojn nome de la indoneziaj esperantistoj. En ĉi tiu kongreso mi konatiĝis kun kelkaj italaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri Indonezio kaj ĝia kulturo. Estis bona okazo por rakonti al ili iomete pri mia lando. Dum kvar tagoj mi havis progresigan kurson, kiun instruis Kristin Tytgat el Belgio. Ĝi multe helpis min. Ĝenerale la aranĝo estis bona, sed mi pensas ke pli detala informado pri la kongreso en la akceptejo estus bonvena, por ke la kongresanoj povu havi taŭgajn informojn.

El ĉiuj programoj kaj agadoj, kiujn mi partoprenis dum mia vojaĝo en Eŭropo, mi akiris gravajn spertojn kiujn mi ne povas forgesi. Miaj renkontiĝoj kun alilandaj esperantistoj donis al mi okazon por koni aliajn kulturojn, akiri ideojn kaj pensojn pri la progreso de la Esperanto-movado. La ĉeesto de esperantistoj el diversaj landoj en la aranĝoj kiujn mi partoprenis, jam plicertigas min ke Esperanto estas vera internacia lingvo, kiu povas unuigi homojn de diversaj fonoj por ke ili komuniĝu sur sama, neŭtrala nivelo.

*Pada bulan Juli sampai Agustus 2011 yang lalu, Esperanto telah memberikan saya pengalaman baru. Perjalanan saya ke Eropa untuk mengikuti beberapa kongres dan event Esperanto telah memberikan saya wawasan dan gambaran bagaimana gerakan Esperanto dan berkembangannya di belahan dunia lain. Adapun kongres dan event yang saya ikuti diawali dengan kongres ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) yang diadakan di kota Kopenhagen, Denmark. Kongres ini berlangsung dari tanggal 17-23 Juli. Dengan mengikuti kongres tersebut, saya memperoleh informasi yang berguna tentang metode yang tepat mengajar Esperanto dan hal-hal yang penting diketahui dalam proses belajar mengajar. Kongres ini dihadiri oleh para peserta yang telah memiliki pengalaman yang cukup lama dalam mengajar Esperanto di negara masing-masing.*

Selanjutnya saya mengikuti Kongres Internasional Esperanto (Universala Kongreso) yang juga diadakan di kota Kopenhagen, tepatnya di Bella Center. Kongres yang dihadiri oleh 1458 peserta dari 66 negara merupakan kongres tahunan yang tahun ini merupakan kongres yang ke-96. Kongres Internasional Esperanto ini berlangsung dari tanggal 23-30 Juli 2011. Sepanjang satu minggu penyelenggaraannya, begitu banyak program yang dilaksanakan, seperti seminar-seminar, konser musik, kegiatan olah raga, kegiatan seni, dan lain sebagainya. Sehingga para peserta memiliki kesempatan yang luas untuk mengetahui perkembangan gerakan Esperanto dan semakin mempererat jalinan persaudaraan sesama Esperantis. Pada malam budaya, saya dan Sabrina mendapat kesempatan untuk menampilkan tarian 'tor-tor' di hadapan seluruh peserta yang hadir di ruang utama 'Zamenhof'.

Pengalaman saya dilanjutkan dengan mengikuti SES (Somera Esperanto-Studado) yang diadakan di kota Nitra, Slowakia dari tanggal 30 Juli sampai 07 Agustus 2011. SES di adakan dengan format kursus yang dibagi ke dalam 5 tingkatan kelas. Untuk itu para peserta diwajibkan untuk mengikuti tes penempatan kelas yang diadakan pada awal program. Selain kursus diadakan pula seminar khusus bagi peserta yang berminat mengajar Esperanto. Berdasarkan hasil tes, saya ditempatkan pada kelas 4. Dengan mengikuti kursus di SES, saya berlatih bagaimana bicara, menulis dan mendengar dengan baik dalam Esperanto. Diakhir kursus setiap peserta mendapat sertifikat keikutsertaan dalam program SES.

Event Esperanto yang saya ikuti selanjutnya adalah konferensi KELI (Kristana Esperanto-Ligo Internacia). Konferensi yang diadakan dari tanggal 02 sampai 09 Agustus 2011 berlangsung di kota Poděbrady, Republik Ceko. Konferensi ini dihadiri oleh 50 orang dari 13 negara. Sebagian besar peserta adalah orang-orang tua yang telah lama aktif dalam organisasi KELI. Dalam konferensi tersebut, dilaksanakan seminar-seminar yang berkaitan dengan perkembangan organisasi, kekristenan di beberapa negara, konser musik, ibadah dan doa. Hal yang berkesan bagi

saya saat mengikuti konferensi KELI adalah pemberian Injil berbahasa Esperanto. Dalam kesempatan mengikuti ekskursi, saya mengunjungi museum tentang cara hidup masyarakat Rep. Ceko tempo dulu dan lokasi-lokasi bersejarah yang berkaitan dengan perkembangan kekristenan.

Untuk yang terakhir, saya mengikuti Kongres Italia Esperanto yang berlangsung di kota Torino pada tanggal 20 sampai 27 Agustus 2011. Program kongres diawali dengan program Verda foiro yang diadakan untuk memberikan informasi tentang perkembangan gerakan Esperanto melalui organisasi dan kegiatan-kegiatan yang sudah dan akan diadakan. Sementara pada acara pembukaan kongres, saya mendapat kesempatan untuk menyampaikan salam pada peserta kongres atas nama Esperantis Indonesia. Pada acara pembukaan tersebut, hadir pula Probal Dasgupta yang adalah Presiden UEA untuk memberikan pidato pembukaan dan pejabat kota setempat. Di kongres itu saya juga mengikuti program kursus Esperanto bersama beberapa Esperantis Italia dengan pengajar Kristin Tytgat dari Belgia. Secara umum saya memiliki kesan bahwa penyelenggara kongres Italia Esperanto masih memiliki kekurangan terutama mengenai koordinasi dan kurangnya informasi detail pada meja registrasi sehingga pada saat datang, banyak Esperantis yang harus menunggu lama untuk mendapatkan informasi yang tepat.

Dari seluruh rangkaian acara dan kegiatan Esperanto yang telah saya ikuti selama perjalanan saya di Eropa, saya memperoleh pengalaman penting yang tidak akan pernah saya lupakan. Pertemuan saya secara langsung dengan Esperantis-Esperantis luar negeri memberikan saya kesempatan untuk mengenal budaya, mengetahui ide-ide dan pemikiran mereka untuk perkembangan gerakan Esperanto. Selain itu kehadiran Esperantis-Esperantis dari berbagai negara dalam kongres dan konferensi yang saya ikuti juga semakin menyakinkan saya bahwa Esperanto memang telah benar-benar menjadi bahasa internasional yang mampu mempersatukan setiap orang dari berbagai latar belakang untuk berkomunikasi dalam kondisi yang setara dan netral.

## Belajar Esperanto dengan Esperantis Belgia dan Rusia di Medan

Gerakan Esperanto di Medan dimulai oleh sedikit orang. Ini adalah sebuah awal baik bagi gerakan Esperanto baru yang terbentuk sekitar akhir tahun 2010. Kedatangan Heidi Goes, Esperantis asal Belgia di tahun 2010 lalu, bertujuan memperkenalkan Esperanto untuk anggota Couchsurfing Medan dan SMA Negeri 3 Medan selama 3 hari. Tujuan Heidi ini disambut positif oleh anggota Couchsurfing dan murid SMA Negeri 3 Medan.

Grup terbentuk berkat dukungan dan dorongan dari Heidi dan teman-teman Esperantis dari kota lain agar kami dapat membuat grup Esperanto buat orang Medan dengan harapan dapat belajar satu sama lain hingga dapat menguasai bahasa Esperanto. Orang yang terdaftar belajar ada 11 orang dengan 4 orang yang aktif dalam "kumpul bersama" setiap acara grup diadakan. Kami mengadakan acara "kumpul bersama" dan diskusi tentang Esperanto dengan suasana tenang dan santai di kafe, restoran atau di rumah salah satu anggota.

Bukan Heidi saja yang datang ke Medan untuk mengajar tentang Esperanto, tetapi Tatjana Loskutova, Esperantis asal Rusia, juga datang ke Medan untuk mengajar Esperanto serta memperkenalkannya ke anggota lain. Tatjana datang pada tanggal 16-21 Agustus 2011. Kedatangan Tatjana menambah semangat belajar Esperanto kami. Tatjana memberikan beberapa buku, lembaran latihan dan kaset CD yang berisi lagu-lagu Esperanto kepada grup Esperanto Medan bertujuan untuk dipelajari secara bersama-sama isi dan lirik lagu-lagunya.

Medan mempunyai grup Esperanto yang kecil dan berharap akan menjadi besar karena sesuai tujuan Esperanto, yaitu bahasa antarbudaya, antarnegara dan bahasa yang netral sehingga siapa

saja dapat mempelajarinya, ditambah Esperanto sendiri adalah bahasa yang mudah dipelajari, mudah dimodifikasi serta tata bahasa yang tak ada pengecualian. *Esperanto estas facila lingvo por ĉiuj.*

*Fine de 2010 Heidi Goes el Belgio konatigis membrojn de Couchsurfing kaj lernantojn de la mezlernejo SMAN 3 en Medan kun Esperanto. Ŝi kaj esperantistoj en aliaj urboj en Indonezio instigis nin daŭre kune lerni tiun lingvon. En aŭgusto ĉi-jare venis ankaŭ Tatjana Loskutova el Rusio por konatigi kaj instrui al ni Esperanton, kio plientuziasmigis la malgrandan grupon en Medan por daŭre lerni ĉi tiun facilan kaj neŭtralan lingvon.*

Reza Pahlevi

*Jen E-lingva resumo de artikoleto aperinta en la antaŭa numero (p. 5)*

**Sperto pri lernado de Esperanto**

Antaŭ ol venis Heidi Goes al Indonezio por instrui Esperanton, mi ne jam aŭdis pri Esperanto. Kiam mi eklernis Esperanton, mia unua impresio estis ke ĝi similas al la germana kaj la franca, kaj eblas facile kompreni la vortprovizon pro la simileco kun aliaj eŭropaj lingvoj. Kiam ni lernis Esperanton, ni ankaŭ spektis filmetojn pri Esperanto-kongresoj, kio instigas min plulerni la lingvon por iam povi partopreni tian kongreson aŭ alian kunvenon de esperantistoj el la tuta mondo.

Wilton Djaya

# Kenalan dengan Esperanto: Internet jadi andalan

Hanung Prakoso

Saya mulai mengenal bahasa Esperanto sekitar tahun 2007. Pada waktu itu saya datang ke Alun-Alun Utara Surakarta, di mana dijual buku-buku dan majalah bekas dengan harga murah. Saya membeli beberapa majalah edisi lama, salah satunya *Intisari*. Di dalam *Intisari* tersebut saya menemukan artikel yang cukup menarik berjudul *Esperanto, Bahasa Dunia Masa Depan?* Saya tertarik pada awalnya terutama karena nama penulisnya yang sudah saya kenal sebelumnya, Mas Yohanes Manhitu. Beliau adalah salah satu teman yang saya kenal di internet, di mana kami sering bertukar pesan melalui mailing list "Lingua Humana", yaitu mailing list yang diperuntukkan bagi orang-orang yang menyukai bahasa (tentu pada masa itu saya belum mengenal bahasa Esperanto, sehingga saya memakai mailing list tersebut untuk melatih bahasa Prancis saya bersama Mas Yohanes).

Setelah membaca artikel tersebut, saya menjadi tertarik dengan bahasa Esperanto, bahasa yang konon didesain sedemikian rupa oleh penggagasnya sehingga sangat mudah untuk dipelajari dibandingkan bahasa-bahasa lainnya. Saya mulai berusaha mencari buku-buku mengenai bahasa Esperanto di toko-toko buku, namun usaha saya tidak membuahkan hasil. Sepertinya masih sangat sulit menemukan buku mengenai Esperanto di Indonesia, atau setidaknya di sekitar tempat tinggal saya. Akhirnya saya melakukan penelusuran lebih lanjut di internet. Usaha ini membuahkan banyak hasil karena di internet telah tersedia berbagai macam artikel dan materi pelajaran tentang Esperanto.

Waktu itu saya menemukan sebuah e-book yang sangat menarik berjudul *A Complete Grammar of Esperanto* karya Ivy Kellerman Reed yang dapat diunduh (secara gratis dan legal) di <http://www.gutenberg.org/ebooks/7787>. Saya segera mengunduh e-book tersebut dan mempelajarinya secara mandiri dengan antusias. Setiap hari saya meluangkan sedikit waktu untuk membacanya, dan semakin lama saya semakin kagum dengan bahasa tersebut beserta pembuatnya, Dr. Zamenhof.

Tata bahasanya logis dan tanpa pengecualian. Penggunaan prefix dan suffix memungkinkan penyusunan kata yang sangat fleksibel tanpa harus terlalu banyak menghafalkan kosa kata, dan masih banyak kelebihan lain dari bahasa ini. Dalam waktu kurang lebih

seminggu, saya sudah menguasai konsep dasar dan kosa kata sederhana yang sering dipakai dalam percakapan sehari-hari. Saya lalu mengirimkan SMS kepada Mas Yohanes Manhitu dalam bahasa Esperanto, beliau segera membalas (pasti dengan sedikit terkejut). Waktu itu saya merasa sangat senang karena mampu berkomunikasi via ponsel dengan Mas Yohanes dalam bahasa tersebut setelah saya mempelajarinya sendiri hanya dalam waktu seminggu.


Kemudian saya mengunduh sebuah software komputer interaktif yang juga sangat bermanfaat untuk belajar Esperanto secara mandiri, yaitu *Kurso de Esperanto*, bisa diunduh secara gratis dan legal di <http://www.kurso.com.br/elshuto.php?en>.

Keberadaan internet sungguh sangat memudahkan dalam mendapatkan materi pelajaran Esperanto, juga dalam menemukan serta berkomunikasi dengan para Esperantis lain di seluruh dunia.

*Mi ekkonis Esperanton en 2007. Tiam mi trovis interesan artikolon pri Esperanto, verkitan de s-ro Yohanes Manhitu en la indonezilingva magazino Intisari. Tiu artikolo ekinstigis mian scivolemon kaj mi provis serĉi Esperantajn librojn en librovendejoj, senrezulte. Mi trovis nenion, ŝajnas al mi ke la libroj pri Esperanto ankoraŭ ne facile troveblas en mia urbo kaj apudaj urboj (eĉ ĝis nun kiam mi skribas ĉi tiun tekston). Do mi serĉis Esperantajn materialojn en la interreto, ĉi-foje kun abunda rezulto.*

*La interreto estas riĉa je Esperantaj rimedoj. Mi elŝutis bonan e-libron kies titolo estas A Complete Grammar of Esperanto de Ivy Kellerman Reed (<http://www.gutenberg.org/ebooks/7787>). Mi mem lernis per tiu e-libro kaj post semajno mi povis poŝtelefono komuniĝi per simplaj frazoj kaj vortoj kun s-ro Manhitu.*

*Poste mi elŝutis ankaŭ la komputilan softvaron Kurso de Esperanto, kiu troveblas ĉe <http://www.kurso.com.br/elshuto.php?en>. Tiu softvaro estas tre utila por komencantoj kiuj ne povas trovi Esperantan instruiston. Danke al la reto, mi povas kontakti kaj komuniĝi kun aliaj esperantistoj en la tuta mondo.*



## Vizito de rusa esperantistino en la Universitato Gunadarma

Estis nur proksimume dudek aŭskultantoj en la E-kurso, ĉar en la samaj tagoj en la universitato estis gastoj el Francio. Krome, estis la komenco de Ramadan, la islama fasto-monato, kaj kelkaj el la dungitoj estis feriantaj. La instruistino estis la rusa esperantistino Tatjana Loskutova. Ŝi estis instruanta kurson en tri tagoj po kvar horojn tage. Ŝi konigis nur la plej gravajn aspektojn de Esperanto sed eĉ tiel en la fino de la kurso la aŭskultantoj jam povis esprimi multon per tiu materialo. Ŝi tute ne uzis peran lingvon, nome lingvon per kiu klarigi la instruatajn materialojn al la aŭskultantoj. Per helpo de bildoj la instruado tamen eblis. Ili mem formis la materialon de la kurso, kio estas nova metodo por instrui novan lingvon. Se la instruata lingvo estus ne Esperanto sed alia, la metodo eble ne tiom sukcesus.

Ekster la kurso, Tatjana ekskursis kun ni al kelkaj interesaj lokoj kiuj estis novaj kaj interesaj eĉ por ni mem indonezianoj. Kun s-ro Eri Prasetyo Wibowo, f-ino Hera Agustina kaj mi, Tatjana eks-

kursis al la "Taman Mini Indonesia Indah" (Miniatura ĝardeno de la bela Indonezio) en Ĝakarta, kiu montras la kulturojn de Indonezio per ekzemploj de tradiciaj domoj kun ĝardenoj kaj artaj eroj en tiuj domoj. En alia tago ni ekskursis al la "Nova tera domo de F. Widayanto" en Depok, kiu prezentas ceramikajojn.

En la lasta tago Tatjana donis al ni multajn memoraĵojn pri Esperanto kaj Rusio, ekzemple librojn pri rusaj artoj, pri Esperanto, rusajn kalendarojn kaj kartojn, kompaktdiskon kun Esperanta muziko kaj vere belan libron de esperantigitaj okcitanaj kantoj de Patrik (mi ŝategas la poemon *Ho, Magali* tie). Krome, ŝi prezentis al ni belegajn fotografajojn pri la Esperanta vivo en Rusio, pri la vojaĝo Moskvo-Mongolio per la trans-siberia trajno kaj ankaŭ belegajn kantojn de Patrik kaj aliaj. Ŝi montris ankaŭ Esperantajn rakontojn kaj saĝajn proverbojn. Tio ĉi metis punkton al nia tre memorinda kunveno kun Tatjana Loskutova, fama rusa esperantistino, kiu estas ankaŭ spertulo pri la franca lingvo.

Ravi Ahmad Salim

# Perjumpaanku dengan Esperanto

Saat menghadiri acara Couchsurfing "Berani Berbagi" saya menemukan sebuah stand bahasa, anehnya bahasa tersebut mempunyai jaringan di seluruh dunia, ada buku-buku pelajarannya, dan ada kongresnya tiap tahun. Mbak Ilia, yang saat itu menjaga stand menjelaskan dengan antusias, katanya ia sebentar lagi akan ke Denmark menghadiri kongres Esperanto sedunia. Adapun di Jakarta ada pertemuan di Plaza Semanggi tiap hari minggu. Maka hari minggu saya mampir dengan dua kawan, Cindy dan Melly. Setelah sekali pertemuan mereka pun tertarik. Pertemuan membahas kosa kata dan tata bahasa Esperanto. Mulanya agak aneh karena lafalnya yang unik. Tapi kita jadi tertarik setelah ikut satu bulan.

Saat ada kabar bahwa bulan Agustus akan ada Esperantis dari Rusia yang datang mengajar di Universitas Gunadarma, saya berniat mengahadirinya dan saya belajar selama tiga hari bersama para dosen dan mahasiswa dari Universitas Gunadarma. Pelajarannya menarik, ada lagu Esperanto, bagaimana cara bertanya dan menyapa, kata benda, kata kerja, nama-nama negara dalam bahasa Esperanto. Juga kami membaca buku *Mamutido Miĉjo* bersama. Tatjana guru kami sudah belajar Esperanto sejak remaja, keluarganya berbicara dalam bahasa Esperanto juga. Beliau juga menguasai bahasa Perancis dan Jerman. Beliau sudah pergi ke berbagai negara mengajarkan Esperanto. Yang unik, beliau tidak bisa berbahasa Inggris maupun bahasa Indonesia, tapi beliau mengajar dengan metode yang menarik.

Menurut guru kami Tatjana, Esperanto digunakan secara luas di Eropa sebagai jembatan untuk mempelajari bahasa Perancis, Jerman dan bahasa lain karena struktur bahasanya yang mudah. Tatjana juga

menceritakan perjalanannya dengan para Esperantis dengan kereta Trans Europe yang terkenal dan memperlihatkan kepada kami kota-kota di Rusia. Pada intinya, Esperanto menyatukan berbagai bahasa dan bangsa. Hal ini yang membuat Esperanto dapat bertahan selama ratusan tahun di seluruh dunia. Adapun Tanggal 15 Desember adalah hari bulang tahun Zamenhof, pencipta bahasa Esperanto yang dirayakan tiap tahun oleh Esperantis di seluruh dunia.

Juga ada bendera Esperanto berwarna hijau dengan bintang di sisi kanan atas. Dan ada lagu kebangsaan Esperanto yang kami nyanyikan pada saat kursus. Hal ini sangat berkesan dan saya tak dapat melupakan bahasa yang unik ini. Terima kasih untuk Haris, Ilia dan Tatjana yang sudah mengenalkan saya pada Esperanto. *Vivu Esperanto!*

*Mi eksciis pri Esperanto kiam mi ĉeestis programon de Couchsurfing (vidu sube). Tiutempe mi trovis ke estas budo pri tiu lingvo. Ilia, kiu prizorgis la budon, provis informi pri Esperanto kaj diris ke ŝi baldaŭ iros al Danio por internacia E-kongreso. Tiam mi eksciis ke estas E-klubo en Ĝakarta kaj ĝiaj membroj renkontiĝas du fojojn monate. Mi interesiĝis por veni al la klubo por kune lerni. Pli poste mi aŭdis ke en aŭgusto estos E-kurso kun rusa esperantistino en la Universitato Gunadarma, kaj mi partoprenis ĝin dum tri tagoj. Tatjana, kiu estis la instruistino, lernis Esperanton jam en la junaĝo kaj ankaŭ ŝia familio parolas ĝin. Laŭ Tatjana, Esperanto jam uzatas larĝskale en Eŭropo kiel pontolingvo, ĉar ĝia gramatiko estas tre facila. La grava punkto estas ke Esperanto povas unuigi homojn el diversaj landoj.*

Susanna Yee

## Mallonge

### La ĝakarta Esperanto-klubo en Couchsurfing-festivalo en Indonezio

La ĝakarta Esperanto-klubo "Esperiga suno" partoprenis la Couchsurfing-festivalon en Indonezio. Dum 3 tagoj (24-26 junio), la organizanto donis okazon al la partoprenantoj de komunumoj havi proprajn budojn. Ĉiuj komunumoj provis klarigi pri siaj agadoj kaj kiel oni povas



membriĝi en ili. Ankaŭ la ĝakarta Esperanto-klubo havis budon por prezenti Esperanton ĝenerale, la Esperanto-movadon kaj la agadon de la klubo. Kelkdeko da vizitantoj haltis ĉe la budo. La plejparto faris demandojn pri Esperanto ĝenerale. Samokaze ni prezentis ankaŭ informojn pri la E-movado en Ĝakarta, filmon pri Esperanto kaj faris donacon al tiuj kiuj povis respondi niajn demandojn pri Esperanto. La celo de ĉi tiu agado estis informi pri Esperanto kaj helpi tiujn kiuj volas eklerni ĝin.

Ilia Sumilfia Dewi

la sekretario de la Esperanto-klubo de Ĝakarta  
(ilia.dewi@gmail.com)

### Elektronika libro

En la antaŭa numero de nia bulteno ni menciis (p. 8) la *Multlingvan frazlibron* de Yohanes Manhitu. La libro nun haveblas en elektronika versio ĉe: <https://docs.google.com/viewer?a=v&pid=sites&srcid=ZGVmYXVsdGRvbWFBpbnc3BlcmFudG9lbmluZG9uZXppb3xneDo0ZGNhNThmMjBkN2ZlMWE>.

### Ĉu vi volas partopreni en la venontjara Universala Kongreso?

Se vi estas indonezia esperantisto loĝanta en Indonezio kaj:

- posedas Esperanton sufiĉe bone por kompreni tiun ĉi tekston,
- pretas partopreni en la plej ampleksa Esperanto-aranĝo,
- estos libera kaj povos vojaĝi al Vjetnamio (28 julio – 4 aŭgusto 2012),
- povos mem parte financi viajn vojaĝkostojn,
- konsideras vin sufiĉe merita por ricevi financon helpon,

tiam kontaktu nin, en Esperanto, por kandidatigi por parte subvenciata partopreno en la Universala Kongreso en Hanojo, menciante vian agadon por/per Esperanto. Mesaĝu al ni: [redakcio-ideo@googlegroups.com](mailto:redakcio-ideo@googlegroups.com).

### Indonezianojn al la Hanojo UK!

Por profiti de la proksimeco de la venontjara UK ni lanĉas kampanjon helpi indoneziajn esperantistojn partopreni la plej grandan Esperanto-aranĝon de la jaro. Se vi povas kaj volas partopreni en tiu kampanjo, bonvolu kontakti nin por ricevi pliajn informojn kaj detalojn. Bonvolu mesaĝi al nia ret-adreso indikita ĉi-supre.